

Francilia asocio, KomitatKunsido 03/12/21

La kunsido okazas je la 6a ptm, surloke en la sidejo, kelkaj partoprenas rete

Partopreno

- Michèle Abada-Simon (MAS) ĉeestas
- Pierre Gauthier (PG), vickasisto ĉeestas
- Marc Giraud (MG), prezidanto rete ĉeestas
- Didier Janot (DJ) sin ekskuzis
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison (DL), kasisto malfrue ĉeestas
- Marielle Martin (MM) rete ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers (LPI), sekretario ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) sin ekskuzis
- Frantz Vichot (FV) rete ĉeestas

Antaŭa KK

La protokolo de la KK de la 18/09/21 estis aprobita kaj enretigita je

<https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj>

Kursoj

- 1a nivelo kun MG, rete, marde vespere, 4 studentoj
- 2a nivelo kun MG rete, marde vespere, 4 studentoj
- 2a nivelo kun MAS surloke, ĵaŭde vespere, 2 studentoj
- 3a nivelo kun FLJ surloke, marde vespere, pli-malpli 6 studentoj

Memorigo, ĉiukaze necesas pagi la aliĝon al Espéranto-France=39€ (ekzistas rabatoj).

- prezo de reta kurso=0€
- prezo de surloka kurso=80€ (ekzistas rabatoj) kun ricevo de 30€ en libroj aĉetataj en la libroservo de Esperanto France.
- Post la venonta ĜA, la tiama KK reparationu la prezojn de la kursoj, ĉar la diferenco inter reta kaj ĉeesta tre grandas.

Tekniko

Ni aĉetu novan draton, HDMI ambaŭflanke, 3-5 metrojn longa. DL prizorgos.

DL repagis tra nia EF-konto ĉe "Arthur" la fakturon ricevitan de Emmanuelle Richard pour la domajnnomo "esperanto.paris" (46,8€).

Aliaj agadoj

- Esperanto-kafejo: okazas ĉiumonate, la duan sabaton vespere, ĉiufoje en alia kafejo. GVN informu pli frue la komitaton!
- Espéranto café croissant: ĉu plu kontentige okazas?
- Ĝemelaj urboj babilrondo kun la romanoj: tre kontentige okazas, rete, ĉiumonate, ĉiufoje kun anoj de alia eksterlanda urbo: Tokio, Seulo, Pekino, Nov-Jorko.
- Kulturaj vesperoj: okazas surloke, ĉiumonate, la 1a merkredo vespere (kaj eble la 3a). La venonta okazos la 5an de januaro. Preparo de filmeto pri humura sketĉo
- Legoklubo: okazas rete, kelfoje dum la jaro, ĉiufoje pri alia legaĵo, la partoprenantoj antaŭe legu la libron. Ne okazis ekde la lasta KK. La venonta okazos la 12an de februaro 2022, ĝi temos pri Solaris
- Ekzamenoj: oni ne scias ĉu okazos ekzamenoj en 2022. Se ili okazos rete, la asocio ne organizos la ekzamenon mem, sed reklamos prie kaj helpas la studentojn prepariĝi.
- Koruso: ne okazas
- Ludtempo: ne okazas, eble denove okazos en januaro, surloke
- Denfert café Poliglot Klubo: eble denove, sed ne baldaŭ
- Turneoj de prelegantoj: ne okazas

Zamfesto

Okazos la 11/12, organizota kun la fervojistoj (Sylviane Lafargue).

DL sendos al ŝi ĉekon je 200€.

POST LA KUNSIDO LA ZAMFESTO ESTAS NULIGATA DE LA FERVOJISTOJ PRO LA KRONVIRUSO.

Reĝkuko

Okazos sabaton la 15an de januaro je 5ptm en la Ĉerizejo.

LPI sendos invitmesaĝon al la membroj.

Oni bezonas volontulojn por prizorgi la reĝkukojn kaj la trinkaĵojn (cidro, pomsuko). La elspezoj estos pagitaj de nia asocio, la volontuloj donu la faktureojn al DL. MG prizorgos, AL helpos

Novjaraj bondeziroj

Nia asocio (MG) sendos mesaĝon de novjaraj bondeziroj al la lokaj asocioj, IFEF, SAT Amikaro, Eo klubo de Romo, yohann.roszewitch@paris.fr (adjoint au maire de Paris Centre en charge de la vie associative).

Preparado de la ĜA 2022

La venonta Ĝenerala Asembleo devas okazi venontan printempon. Oni elektas la daton: la 19an de marto. Ni devas: peti kunsidoĉambron en la urbodomo (se necese), komence de januaro sendi mesaĝon al la membroj kun novjaran bondeziron, instigo al realiĝo al Esperanto France, instigo al kandidatiĝo al la Komitato antaŭ la fino de januaro, Ni sendu inviton al la ĜA 2022 komence de februaro kun praktikaj detaloj, listo de kandidatoj. Ni preparu raportojn financa kaj agada, organizu la voĉdonadon (kiel eble plej rete), organizu la tagon de la ĜA (tagmanĝo, vizito).

(punkto sekreta, ne enretigu)

Projektoj

La tuta listo de projektoj legeblas en la protokolo de la KK de la 29/01/21:

<https://esperanto.paris/IMG/pdf/2021-01-29.pdf>

- Ekspozicio pri Péraire: GVN, neniu informo
- Junaj volontuloj: Marion Quenut (Tuluzo) spertas pri tio kaj pretas helpi asociojn por havi junajn volontulojn pagitaj de naciaj aŭ eŭropaj rimedoj (volontula servo (service civique), Erasmus+...). PG rigardas la temon
- Paĝmarkiloj: PG transdonu la fakturon al DL. Ili estas en ŝranko de la klasĉambro en la Ĉerizejo. Ni disdonos ilin dum festoj kaj en budoj (kiel la kalendaretoj) kaj en la libroservo, en ĉiu libro aĉetita. PG petos tion de Susanna.
- Dissendolisto: kiu administras la liston esperanto-paris@googlegroups.com ? Ĉu DJ? Ĉu eblas fandigi kun nia dissendolisto amikaro-francilio@googlegroups.com ? Neniu informo

Respondecoj pri agadoj (rememorigo)

Notu bone: iuj agadoj nun ne okazas, sed eble denove okazos

- * Kursoj : MAS MG FLJ
- * Agadoj kun Romo, legoklubo : MG
- * Ludoj : AL kun JEFO
- * Ekzamenoj : FLJ
- * Esperanto kafejo: GVN
- * Kulturaj vesperoj: LPI PG
- * ĥoro : MG
- * Prelegturneoj : FLJ

Respondeculoj pri informkanaloj (rememorigo)

La unua kanalo estas la retejo <https://esperanto.paris> la aliaj kanaloj reeĥas la informojn.

- * Retejo DJ AL
- * Facebook MG DL
- * Twitter PG
- * Dissendolisto amikaro LPI (MG)
- * Telegram AL
- * Amikumu PG
- * Eventaservo MG
- * Duolingo LPI
- * Meet-Up DJ
- * Esperanto-aktiv (postaj informoj) LPI
- * informi la urbodomon por ĝia dissendolisto Ĉu DJ faras tion? Se ne, DL pretas fari

Venonta KK

KK okazas trimestre, sed por prepari la ĜA necesas kunsidi jam en januaro.

La venonta KK okazos la 28an de januaro je la 6a ptm surloke kaj rete.

FINO DE LA KK